

Reformo de la esperanto-instruado, 4-a parto
Claude Gacond, 179-a radioprelego, 1967.03.15 & 1967.03.18

VI.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vidis dum kelkaj elsendoj diversajn kaŭzojn, kiuj necesigus revizion de la esperanto-instruado. Tiuj prelegoj povis doni al vi la impreson, ke ni kritikis, sed nenion proponas. De hodiaŭ vi rimarkos, ke ni proponas rimedojn, kiuj povus progresigi la instruadon de nia lingvo.

A.- La instruado de fremdaj lingvoj dum la dek pasintaj jaroj multe progresis dank'al la malkovro de la usonaj psikologoj kaj al la perfektigo de la magnetofonoj. Nova instrutekniko naskiĝis. Ĝi analizas la refleksojn, kiuj estas lernendaj por akiri novan konon.

Cl.- Tiu instrutekniko estas nomata **programita instruado**. Ĝi devigas la lernanton mem kontroli ĉiujn siajn respondojn kaj volas, ke li plej malofte eraru.

A.- Por la lingva instruado tiu tekniko imagis novajn registriilojn. En ili la lernanto aŭdas demandojn kaj provas respondi. Lia voĉo estas registrita, kaj li povas sin tuj reaŭdi. Konstante li povas kompari sian prononcon kaj sin korekti.

Cl.- Grava principo de la programita instruado estas la respekto de la propra labora kaj asimila ritmo de ĉiu lernanto. Programado signifas individualigon de la instruado.

A.- Sed tamen la instruado estas ĝenerale kolektiva. Oni devis imagi registriilojn, kiuj ebligas al tuta klaso samtempe labori. Sur ĉiu tablo troviĝas registriilo, kaj la lernantoj surmetas aŭdilojn, ili parolas ĉe mikrofono kaj sidas en vitra ĉelo. La profesoro sidas antaŭ elektrona cerbo kaj havas la eblon kontroli la laboron de ĉiu lernanto. Li povas interveni por doni kolektivajn instruojn aŭ individuajn klarigojn.

Cl.- Tiujn klasejojn oni nomas lingvo-laboratorioj. Ili kostas multege, kaj bedaŭrinde malofte estas uzataj por instrui nian lingvon. Tamen ili povus multon alporti ankaŭ al la esperanto-instruado, ĉar estas sufiĉe facile transformi stereofonan registrilon **Revox** por ludigi al ĝi la rolon de magnetofono de lingvo-laboratorio. Kaj certe ekzistas aliaj aparatoj eĉ malplikostaj, kiuj povas facile samtempe paroli kaj registri. Ili konvenas al la instrutekniko de la lingvolaboratorio.

A.- Dum la pasinta jaro ni faris tiurilate interesajn eksperimentojn en Svislando. Grupo de edukistoj kunvenis plurfoje en la lernejo de la vilaĝo La Sagne por ekprovi elementan kurson de esperanto.

Cl.- Tiu kurso estas programita por franclingvanoj kaj instruas la prononcon kaj kontrolas la paroladon helpe de lingvolaboratoria magnetofono. Por ke vi havu ideon pri la funkciado de tiu registriilo, ni prezentos al vi la unuan bendon, kiu signifas por la lernanto la unuan kontakton kun esperanto.

A.- La lernanto ricevas folion sur kiu estas skribitaj dek proverboj. Li sidas antaŭ mikrofono kaj surmetas aŭdilojn. En la franca li aŭdas klarigojn :

Cl.- *La profesoro legas proverbon. Aŭskultu ĝin silente ! Legu poste la proverbon ! Aŭskultu poste la profesoron, kiu ripetas la proverbon ! Ripetu poste duan fojon la proverbon ! Jen ekzemplo :*

A.- Tiam la lernanto aŭdas tiun ĉi ekzemplon :

Cl.- La profesoro.- Unua ekzerco, ripetu : *La vesto ne estas la homo !*

A.- La lernanto : *La vesto ne estas la homo !*

Reformo de la esperanto-instruado, 4-a parto
Claude Gacond, 179-a radioprelego, 1967.03.15 & 1967.03.18

Cl.- Post tiu klarigo komenciĝas la laboro. La bendo diras :

A.- *Atentu ! Nun komenciĝas la laboro kun la sama proverbo.*

Cl.- Tiam la lernanto provas ripeti la proverbojn, kiujn li aŭdas. Li ne havas la tempon provi ilin traduki. Li nur devas atenti pri sia prononco. Jen la proverboj, kiuj estas elektitaj :

A.- La vesto ne estas la homo.

Cl.- Manko de oro, ne estas malhonoro.

A.- Kion oni volas, tion oni povas.

Cl.- Kion vi semas, tion vi rikoltos.

A.- Grandaj malbonoj, grandaj rimedoj.

Cl.- Espero panon ne donas.

A.- Kiu ne riskas, tiu ne gajnos.

Cl.- Kia patro, tia filo.

A.- Silentu donante, parolu ricevante !

Cl.- Kiom da homoj, tiom da gustoj.

A.- Tiuj proverboj estas elektitaj pro diversaj kialoj. Ili uzas radikojn, kiuj ne estas fremdaj al la franclingva publiko, ne estas en ili ĉapelitaj literoj. Sed nia intenco ne estas klarigi al vi la elekton de tiuj proverboj, sed nur rakonti al vi, kiel lernanto laboras en la lingvolaboratorio. Li nun aŭdas klarigojn pri la esperanta akcentado. Poste li ricevas la ordonon reaŭskulti la tuton.

Cl.- Se li estas kontenta pri sia prononco, li rajtas iri al la sekvanta ĉapitro de la programita kurso. Tiam li lernos, kio estas nomo.

A.- Se li ne estas kontenta pri sia prononco, li rekomencas la ripetadon de la proverboj. Li tiam havas plian fojon la eblecon kutimiĝi al la esperanta fonetiko.

Cl.- La venontan semajnon ni prezentos al vi ĉapitron de tiu programita kurso. Vi tiel pli facile malkovros la originalecon de tiu instrumentado.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-